

KARESMO

Instrukcioj por uzo

Per la cindromerkredo komenciĝas la karesmo. Por kompreni la signifon de tiu ĉi periodo necesas ekzameni la malsaman liturgion antaŭ- kaj post-koncilian.

Antaŭ la liturgia reformo, la surmeto de la cindroj estis akompanata per la vortoj “Memoru ke vi estas polvo kaj ke polvo vi refariĝos”, laŭ la malbeno de la Sinjoro al la pekinta homo entenata en la Libro de Genezo (Gen 3,19). Kaj per tiu funebra admono komenciĝis periodo karakterizata per pentofaroj, oferoj kaj humiliĝoj. Nuntempe la surmeto de la cindroj estas akompanata per la evangelia invito “Konvertiĝu kaj kreu je la evangelio”, laŭ la unuaj vortoj eldiritaj de Jesuo en la Evangelio de Marko (Mk 1,15). Invito al vivoŝanĝo, per la orientado de propra ekzisto al la alies bono kaj al aliĝado al la bona novaĵo de Jesuo. La homo ne estas polvo kaj ne refariĝos polvo, sed li estas filo de Dio, kaj pro tio li havas vivon de tia kvalito ke ĝi estas eterna, tio estas nedetruibla, kaj pro tio kapabla superi la morton. En tiuj du malsamaj teologiaj strukturoj, enestas la signifo de la karesmo.

Neniam Jesuo dum sia instruado invitis pentofari, humiliĝi, kaj des malpli oferi. Eĉ, li diris la malon: “Mizerikordon mi volas kaj ne oferojn” (Mt 12,7). La oferoj centrigas la homon sur sin mem, sur propran spiritan perfektecon, la mizerikordo orientadas la homon al la bono de la frato. Oferoj, pentofaroj, humiliĝoj fakte nur centrigas la homon sur sin mem, kaj nenio povas esti plej danĝera kaj mortiga ol tiu konduto.

Paŭlo el Tarso, kiu, estante fanatika fariseo, estis konvinta asertanto de tiuj ritoj, postkiam li konis Jesuon, li eĉ skribos en la Letero al Kolosanoj: “Neniu do vin kondamnu rilate manĝon kaj trinkon, aŭ festojn, novlunoj, kaj sabatoj... Se vi mortis kun Kristo al la elementoj de la mondo, kial kiel se vi ankoraŭ estus vivantaj en la mondo, lasi trudi al vi preceptojn kiaj: Ne prenu, ne gustumu, ne tuŝu? Tiuj estas ĉiuj aferoj destinitaj malaperi per la uzado, preskriboj kaj homaj instruoj, kiuj ŝajnas scion per sia falsa religieco kaj humileco kaj humiliĝo de la korpo, sed reale ili havas neniun valoron krom tiu kontentigi la karnon” (Kol. 2,16.20-23).

Paŭlo komprenis tre bone ke tiuj ritoj centrigas la homon sur sin mem, en la miraĝo de neebila spirita perfekteco, tiom fora kaj ne atingebla kiom granda estas propra ambicio. Pro tio Jesuo invitas male al donaco de si mem, tuja kaj konkreta, samkiel estas granda propra amkapablo. Karesmo ne estas orientita al sankta vendredo, sed al releviĝa Pasko. Pro tio ĝi ne estas tempo de humiliĝoj, sed de viviĝoj. Oni devas eltrovi novajn formojn, originalajn, ne antaŭe utiligatajn, de pardono, sindonemo kaj servado, kiuj levas la kvaliton de propra amo por ĝin akordiĝi kun tiu de la Vivanto, kaj tiel sperti la Paskon kiel vivplenecon de Kristo kaj propran.

Pro tio nuntempe estas la surmeto de la cindroj. Rito kiu referencas al la agrara kutimo de la kamparanoj kiuj konservas dum la tuta vintro la cindrojn de la kameno, por poste, ĉirkaŭ je la fino de la vintro, ilin disjeti sur la grundon, kiel vivigan faktoron por doni novan energion al la grundo.

Kaj tio estas la signifo de la cindroj: la akcepto de la bona novaĵo de Jesuo (“Konvertiĝu kaj kreu je la evangelio”) estas la viviga elemento kiu vivigas nian ekziston, malkovrigas novajn originalajn formojn de amo, kaj florigas ĉiujn tiujn donackapablojn kiuj estas latentaj kaj kiuj atendadis nur la taŭgan momenon por emergi.

Bondezirojn!

Alberto Maggi